WIKIPEDIA

Tagaloga lingvo

La **tagaloga lingvo** estas lingvo de Filipinoj.

Tagaloga lingvo	
Wikang Tagalog	
Parolata en	Filipinoj, Gvamo
Parolantoj	24 000 000
Denaskaj parolantoj	>23 milionoj
Fremdlingvo / dua lingvo por	>80 milionoj
Skribo	Latina skribo
Lingvistika klasifiko	
Aŭstronezia	
Malajo-polinezia lingvaro	
Okcidenta malajo-polinezia lingvaro	
centra filipina lingvaro	
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	tl
ISO 639-2	tgl
ISO 639-3	tgl
SIL	TGL
Glottolog	taga1280
Angla nomo	Tagalog
Franca nomo	tagalog
Vikipedio	

Enhavo

Lingvara membreco

Origino

Gramatiko
- Fokuso
- Verbo
  - Verba konjugacio por <sulat> (skribi)
  - Verba konjugacio por <kain> (manĝi)
  - La faktitivo por <sulat> (skribi)
  - La faktitivo por <kain> (manĝi)
  - La gerundio
- Stataj priskriboj
- Pronomoj
  - Fokusaj
  - Malfokusaj
  - Antaŭsubstantivaj posesivaj
  - Prepoziciaj
- Nombro

Fonologio
- Konsonantoj
- Vokaloj kaj kvazaŭvokaloj
- Diftongoj
- Alfabeto
- Supersignoj
- Ekzemplo de kompletaj frazoj
  - <ng> kaj <nang>

Historio

Pruntvortoj

Hispana influo

Gvidlinioj por la plibona Tagaloga

Gvidlinioj por la kutima Tagaloga

Skribado per la antikva *Baybayin*

Rekomendataj vortaroj

Eksteraj ligiloj

Lingvara membreco

La **Tagaloga lingvo** estas membro de la Aŭstronezia lingvaro kaj unu el la indiĝenaj lingvoj de Filipinoj. La lingvo Filipino, la teoria plilarĝigo de la Tagaloga, estas oficiala lingvo kaj la nacia lingvo en Filipinoj.

Origino

La Aŭstronezia lingvaro teorie origine venis el Tajvano kaj ekspansiis tra la Pacifikon ekde la jaro -4000. Teorie, la lingvaro rezultis el la kultura kolizio inter Mongoloidoj kaj Aŭstraloidoj eĉ pli frue ol la jaro -4000.

Gramatiko

La Tagaloga gramatiko estas morfologie pli malsimpla ol la Indonezia, ĝia kuza lingvo. La verbo ŝanĝiĝas al multaj formoj, depende de la aspekto, la modo, la fokuso, kaj tiel plu. La Tagaloga frazstrukturo estas kutime de VSO (Verbo-Subjekto-Objekto) kiel <Nag-aral ang batà ng aghám> (Studis la junulo sciencon), sed aliaj frazstukturoj eblas, tipe VOS kaj SVO.



Tagaloga komikso





Fokuso

La **fokuso** en la frazo ludas gravan rolon en la Tagaloga kaj la verbo ŝanĝiĝas laŭ tiu. La fokuso povas esti sur la aktoro, objekto, loko, profitanto, aŭ instrumento. La fokusa indikilo estas <ang> kaj la malfokusa indikilo estas <ng> prononcata /naŋ/. La plej oftaj fokusoj estas la aktoro kaj la objekto. La vortetoj <ang> kaj <ng> povas esti tradukataj kiel <la>, sed tiu ne estas preciza.

<Nagsulát ang batà ng aklát.> [aktoro]
(Skribis *la junulo* la libron.)

<Sinulat ng batà ang aklát.> [objekto]
(Skribis la junulo *la libron*.)

<Sinulatan ng batà ang aklát.> [loko]
(Skribis la junulo *en la libro*.)

<Ipinagsulat ng batà ang iná.> [profitanto]
(Skribis la junulo *por la patrino*.)

<Ipinangsulat ng batà ang lapis.> [instrumento]
(Skribis la junulo *per la krajono*.)

Verbo

La Tagaloga verbo ŝanĝiĝas laŭ la aspekto anstataŭ laŭ la tenso.

Verba konjugacio por <sulat> (skribi)

	Kompleta ("Preterita")	Nekompleta ("Prezenca")	Kontemplata ("Futura")	Imperativa
Aktoro	nagsulát	nagsúsulát	magsúsulát	magsulát
Objekto	sinulat	sinusulat	isusulat	isulat
Loko	sinulatan	sinusulatan	susulatan	sulatan
Profitanto	ipinagsulat	ipinagsúsulat	ipagsúsulat	ipagsulat
Instrumento	ipinangsulat	ipinangsúsulat	ipangsúsulat	ipangsulat

Verba konjugacio por <kain> (manĝi)

	Kompleta ("Preterita")	Nekompleta ("Prezenca")	Kontemplata ("Futura")	Imperativa
Aktoro	kumain	kumakain	kakain	kumain
Objekto	kinain	kinakain	kakainin	kainin
Loko	kinainan	kinakainan	kakainan	kainan
Profitanto	ipinagkain	ipinagkakain	ipagkakain	ipagkain
Instrumento	ipinangkain	ipinangkakain	ipangkakain	ipangkain

La faktitivo por <sulat> (skribi)

	Kompleta ("Preterita")	Nekompleta ("Prezenca")	Kontemplata ("Futura")	Imperativa
Faktitivo	ipinasulat	ipinasúsulat	ipasúsulat	ipasulat

La faktitivo por <kain> (manĝi)

	Kompleta ("Preterita")	Nekompleta ("Prezenca")	Kontemplata ("Futura")	Imperativa
Faktitivo	ipinakain	ipinakakain	ipakakain	ipakain

La gerundio

Verbotipo	Verbo	Gerundio	Ŝablono
mag-verbo	magsulát (skribi)	pagsúsulát (skribado)	ripeto de la unua silabo de la radiko
um-verbo	kumain (manĝi)	pagkain (manĝado)	ne ripeto de la unua silabo de la radiko

Stataj priskriboj

Estas interese rimarki, ke frazoj, kiuj ampleksas statajn priskribojn, estas esence sentempaj. Aldonitaj adverboj povus indiki la tempon. Adjektivo povas agi kiel pseŭdoverbo.

<Malakí ang punò.>
[Granda *la arbo*.]
(*La arbo* estis/estas/estos granda.)

<Ang punò ay malakí.>
[*La arbo* <kopulo> granda.]
(*La arbo* estis/estas/estos granda.)

<Noón malakí ang punò.>
[Antaŭe granda *la arbo*.]
(Antaŭe *la arbo* estis granda.)

<Ang punò ay malakí ngayón.>
[*La arbo* <kopulo> granda nun.]
(*La arbo* estas nun granda.)

<Berde ang ibon.>
[Verda *la birdo*.]
(*La birdo* estis/estas/estos verda.)

Pronomoj

Fokusaj

persono	singulara	duala	plurala
1-a	akó	kamí	
1-a & 2-a	_	kitá	tayo
2-a	ikáw / ka	kayó	
3-a	siyá	silá	

Malfokusaj

persono	singulara	duala	plurala
1-a	ko	namin	
1-a & 2-a	_	nitá	natin
2-a	mo	ninyó	
3-a	niyá	nilá	

<Kinain ko ang litsón.>
(Manĝis mi *la rostporkaĵon*.)

<Kumain siyá ng isdâ.>
(Manĝis *li aŭ ŝi* la fiŝon.)

<Kinain niyá ang isdâ.>
(Manĝis *li aŭ ŝi* la fiŝon.)

<Kinain nilá ang litsón.>
(Manĝis ili *la rostporkaĵon*.)

<Kumain kayó ng isdâ.>
(Manĝis *vi* la fiŝon.)

<Ipinakakain kayó ng isdâ ni Carlo.>
(Manĝigas *vin* de fiŝo Karlo.)

<Gusto niyá ang pagsúsulát.>
(Ŝatas *li aŭ ŝi* la skribadon.)

Por montri ĝentilecon al dua singulara persono, kiu estas pli aĝa aŭ respektata, la uzo de la dua plurala persono pli taŭgas (<kayó> / <ninyó>). La malfokusaj pronomoj ankaŭ povas esprimi la posesivon (postsubstantivan).

<Kumain kayó ng isdâ nilá.>
(Manĝis *vi* la fiŝon ilian.)

<Kinain ko ang isdâ mo.>
(Manĝis mi *la fiŝon vian*.)

La dua singulara persono ka estas uzata nur post verbo aŭ pseŭdoverbo, kvankam la alia plena formo *ikáw* povas esti uzata antaŭ aŭ post verbo aŭ pseŭdoverbo.

<Kumain ikáw ng suman nilá.>
(Manĝis *vi* la rizkukon ilian.)

<Ikáw ay kumain ng suman nilá.>
(*Vi* manĝis la rizkukon ilian.)

<Kumain ka ng suman nilá.>
(Manĝis *vi* la rizkukon ilian.)

<Magandá ka.>
(Bela estas *vi*.)

<Ikáw ay magandá.>
(*Vi* estas bela.)

Antaŭsubstantivaj posesivaj

persono	singulara	duala	plurala
1-a	aking	aming	
1-a & 2-a	_	kanitáng	ating
2-a	iyong	inyóng	
3-a	kanyáng	kaniláng	

Prepoziciaj

persono	singulara	duala	plurala
1-a	akin	amin	
1-a & 2-a	_	kanitá	atin
2-a	iyo	inyó	
3-a	kanyá	kanilá	

<Kumain kayó ng kaniláng suman sa atin.>
(Manĝis *vi* ilian rizkukon ĉe ni.)

<Kinain ko ang iyong suman dahil sa kanilá.>
(Manĝis mi *vian rizkukon* pro ili.)

<Kinain namin ang iyong suman para sa kanilá.>
(Manĝis ni *vian rizkukon* por ili.)

Nombro

La nuda substantivo per ĝi mem ne indikas nombron.

<Lumipád ang ibon.>
(La birdo [aŭ birdoj] flugis.)

La plurala indikilo <mga> difine indikas la pluralon.

<Lumipád ang mga ibon.>
(La birdoj flugis.)

Fonologio

Konsonantoj

Konsonantaj fonemoj

	Labialo		Dentalo/ Alveolaro		Postalveolaro		Palatalo	Velaro		Glotalo
Nazalo	m		n				ɲ	ŋ		
Plozivo	p	b	t	d				k	g	ʔ
Frikativo			s		ʃ					h
Afrikato			ts		tʃ	dʒ				
Klako			ɾ							
Aproksimanto			l				j	w		

Fonemo	Ortografio	Aspekto
Plozivoj		
p	"p" (*pulá*)	
b	"b" (*bugháw*)	
t	"t" (*tao*)	Kiam j sekvas ĝin, la rezulta sono estas [tʃ].
d	"d" (*diláw*)	Kiam j sekvas ĝin, la rezulta sono estas [dʒ].
k	"k" (*kamáy*)	k emas iĝi [kx] vortstarte. Intervokala k emas iĝi [x], kiel per *bakit* aŭ *takót*.
g	"g" (*gulay*).	
ʔ	"-" (*mag-uwi*), kutime ne skribita vortfine (*galâ*) aŭ intervokale (*buang*)	Glotŝtopo ofte malaperas frazmeze vortfine (*Hindî ako*), speciale en Manilo. La vokalo, kiun ĝi sekvas, longiĝas. Tamen, per aliaj dialektoj, la glotŝtopo konserviĝas. La cirkumflekso, indiĝennome *"pakupyâ"*, indikas vortfina glotŝtopo.
Frikativoj		
s	"s" (*sangá*)	Kiam j sekvas ĝin, ĝi prononciĝas kiel [ʃ].
ʃ	"sy" (*sya*) (formo de siyá)	
h	"h" (*hawak*)	Ĝi ofte malaperas en rapida parolado.
Afrikatoj		
tʃ	"ts" (*tsokolate*) "ty" (*tyan*) (formo de *tiyán* (stomako))	Ĝi povas prononciĝi kiel [ts].
dʒ	"dy" (*dyan*) (formo de *diyán* (there))	
ts	"zz" (*pizza*) "ts" (*tatsulok*)	Ĝi ofte prononciĝas kiel [tʃ].
Nazaloj		
m	"m" (*matá*)	
n	"n" (*nais*)	
ɲ	"ny" (*anyo*)	
ŋ	"ng" (*ngitî*)	Asimilado al [m] antaŭ b kaj p (*pampasiglá*) kaj al [n] antaŭ "d", "l", "s", kaj "t" (*pandiwà*). Kelkaj prononcas ŋg kiel [ŋŋ].
Lateraloj		
l	"l" (*larawan*)	
Rotikoj		
ɾ	"r" (*saráp*, *kuryente*)	Ĝi estis antikve alofono de d. Ĝi povas prononciĝi kiel [ɹ] aŭ [r].

Vokaloj kaj kvazaŭvokaloj

Fonemo	Ortografio	Alofonoj
		Vokaloj
a	"a"	a ofte iom leviĝas al [ə ~ ʌ ~ ɐ ~ ạ] depende de parolanto (*ináng bayan* [iˈnɐŋ ˈbɐjən], ideale [iˈnạŋ ˈbạjạn]). La diftongo ai kaj la sekvaĵo aʔi emas iĝi [eɪ ~ ɛː]. La diftongo au kaj la sekvaĵo aʔu emas iĝi [oʊ ~ ɔː].
ɛ	"e" en iu ajn pozicio, "i" silabfine (krom Anglaj pruntvortoj)	ɛ povas kelkfoje prononciĝas [i ~ ɪ ~ e].
i	"i"	Malstresa i kutime prononciĝas [ɪ]. Silabfine, i povas ofte prononciĝi [ɪ ~ i ~ e ~ ɛ]. [e ~ ɛ] estis antikve alofonoj de [ɪ ~ i]. /i/ antaŭ s-konsonantgrapoloj emas malaperi, kiel per *isports* [sports] kaj *istasyón* [staˈʃon].
o	"o"	o povas ofte prononciĝi [u ~ ʊ ~ ɔ]. [o ~ ɔ] estis antikve alofonoj de [u ~ ʊ]. o morfas al [u] antaŭ "mb" kaj "mp" (*Bagumbayan*, *kumbento*).
u	"u"	Malstresa u kutime prononciĝas [ʊ].
		Kvazaŭvokaloj
j	"y" (*yugtô*)	
w	"w" (*wakás*)	

Diftongoj

La Tagaloga havas 6 diftongojn: /aɪ/, /ɔɪ/, /ʊɪ/, /iʊ/, /aʊ/, kaj /ei/; ortografie, <ay>, <oy>, <uy>, <iw>, <aw>, kaj <ey>.

Alfabeto

La Tagaloga antaŭ 1987 (Pilipino) havis 20 literojn: A, B, K, D, E , G, H, I, L, M, N, Ng, O, P, R, S, T, U, W, Y. Ĝi havas simplan sonsistemon kaj havas foneman ortografion. Tiuj literoj rilatas al la fonemoj /a b k d e g h i l m n ŋ o p r s t u w j/. Kelkaj fremdaj fonemoj ekzistas kiel en la vortoj <dyip> /dʒip/ (ĵipo) kaj <tsinelas> /tʃi.'ne.las/ (pantofloj). La grafemo <dy> mapumas al /dʒ/, la grafemo <ts> al /tʃ/, kaj la grafemo <sy> al /ʃ/. Sed, la vortoj <diyan> (tie), <tiyán> (stomako), kaj <siyá> (li/ŝi) rapidparole mapumas al /dʒan/, /tʃan/, kaj /ʃa/, laŭvice. Ekzistas aliaj tiaj vortoj kune kun tiaj grafemoj; ekzemple, <diksiyonaryo> /dik.ʃo.'nar.jo/.

En bazlernejo, la nomoj de la literoj estis <a ba ka da e ga ha i la ma na nga o pa ra sa ta u wa ya>.

La Tagaloga ekde 1987 (Filipino) havas 28 literojn: A, B, C, D, E, F, G, H, I, J, K, L, M, N, Ñ, Ng, O, P, Q, R, S, T, U, V, W, X, Y, Z. En bazlernejo, la nomoj de la literoj proksimume sonas kiel en la Angla /ej bi si di i ef.../, sed ja 'Ñ' estas /'en.je/ kaj 'Ng' estas /'en.'dʒi/.

Supersignoj

La akcento en la Tagaloga, malsame kiel en la Indonezia, estas neregula. Akcentaj indikiloj kiel supersignoj estas nedevigaj, plej ofte ne uzataj. Bonaj vortaroj devas havi la supersignojn. Estas tri supersignoj uzataj:

[0] Kiam ne estas supersigno [malumay], la akcento estas antaŭlasta:
<koeksistente> /ko.ʔek.sis.'ten.te/ (kunekzistanta)
<tambusan> /tam.'bu.san/ (balkono)

[1] La dekstrakorna supersigno [mabilís] indikas simplan akcenton sur la vokalo:
<matá> /ma.'ta/ (okulo)
<índibidwalísmo> /'ʔin.di.bid.wa.'lis.mo/ (individuismo)

[2] La maldekstrakorna supersigno [malumì] estas uzata vortfine kaj indikas ke la akcento estas antaŭlasta kaj la lasta vokalo finiĝas per la glotŝtopo /ʔ/:
<dilà> /'di.laʔ/ (lango)
<dalirì> /da.'li.riʔ/ (fingro)

[3] La cirkumfleksa supersigno [maragsâ] estas uzata vortfine kaj indikas ke la akcento estas lasta kaj la lasta vokalo finiĝas per la glotŝtopo /ʔ/:
<mukhâ> /muk.'haʔ/ (vizaĝo)
<bintî> /bin.'tiʔ/ (suro)

Inter vokaloj kaj antaŭ vortkomencaj vokaloj, oni kutime metas glotŝtopon /ʔ/:
<paa> /'pa.ʔa/ (piedo)
<tao> /'ta.ʔo/ (persono)
<ilóng> /ʔi.'loŋ/ (nazo)
<umaga> /ʔu.'ma.ga/ (mateno)

La fonemo /ŋ/ povas komenci vorton: <ngipin> /'ŋi.pin/ (dento).

La vokalaj grafemoj <a e i o u> rilatas esence al la fonemoj /a e i o u/ proksimume kiel per la Hispana, sed la Tagaloga grafemo <a> pli precize rilatas al fonemo pli levata, donante al la lingvo pli maĉantan sonon: [ạ].

La neakcentata /i/ sonas kiel [ɪ] kaj la neakcentata /u/ sonas kiel [ʊ]. Ili sonas kiel en la Anglaj vortoj <pit> kaj <put>.

Ekzemplo de kompletaj frazoj

<Tumakbó, kasama; ang lumang mundó ay nasa likód mo na!>
(Kuru, kamarado; la olda mondo troviĝas malantaŭ vi!)

<Lumulutang ang kanyáng gintóng buhók sa hangin ng tag-init.>
(Flosas lia ora hararo en la somera vento.)

<Tinapos niyá ang paghahanáp ng mga perlas.>
(Li finis sian serĉon por perloj.)

<Hindî nawáwalán ng tubig ang aming nayon.>
(Ne mankas akvo ĉe nia vilaĝo.)

<ng> kaj <nang>

La vorto <ng> estas ofta mallongiĝo prononcata /naŋ/ kaj estas la ergativa aŭ genitiva indikilo. La vorto <mga> estas ofta mallongiĝo prononcata /ma'ŋa/ kaj estas la plurala indikilo.

La vorto <nang> estas homonimo de <ng> kaj uziĝas en kiamaj esprimoj, kiomaj esprimoj, adverbaj esprimoj, kaj duoblaj esprimoj, kiel en <takbó nang takbó> ("kuranta kaj kuranta"). La vorto <nang> uziĝas ankaŭ en konektaĵo de <na> kaj <ng>, kiel en <Sobra nang pagkain ang pista> ("Jam troas la manĝaĵo ĉe la festo").

Historio

La historio de la Filipina kiel la nacia lingvo ampleksas multajn jardekojn. La Nacia Lingva Instituto stariĝis la 13an de novembro de 1936 sekve al la *Komunuma Akto Numero 184* por la studado pri la Filipinaj lingvoj por evoluigi kaj adopti komunan nacian lingvon bazotan sur unu el ekzistantaj indiĝenaj lingvoj. Tio necesigis la studadon pri ĉiuj indiĝenaj lingvoj parolitaj de pli ol duonmiliono da Filipinanoj kaj la elekton de lingvo kiel la bazo de la nacia lingvo. En 1937 la Instituto rekomendis la Tagalogan kaj eldonis gramatikon kaj vortaron. En 1959 la Departemento de Eduko nomis la Tagalog-bazitan lingvon "Pilipino" kaj ekdisvastigis ĝin. Estas multaj novaj vortoj kreitaj el malnovaj radikoj. Pilipino kaj la Angla restis kiel oficialaj lingvoj. En la 1970aj jaroj, Pilipino enkondukiĝis kiel la lingvo de edukado kune kun la Angla.

La Konstitucio de 1973 do deklaris, ke la Nacia Asembleo devus evoluigi kaj adopti komunan nacian lingvon nomotan "Filipino" kun 'F', supozeble bazotan sur Pilipino kun 'P'. La Konstitucio de 1987 deklaris, ke la nacia lingvo de Filipinoj estas Filipino, evoluanta kaj riĉigata je la bazo de ekzistantaj Filipinaj kaj aliaj lingvoj. Kielmaniere Filipino kaj Pilipino malsamas? Filipino [1] havas pli da fonemoj aŭ literoj; [2] havas malsaman sistemon de ortografio; [3] havas pli da pruntvortoj el la Angla; [4] havas malsaman gramatikon. La aktuala Manila Tagaloga estas la bazo de Filipino. Estas oportune, ke en Esperanto oni povus uzi la vorton "Filipina" kiel sinoniman ĝeneralan vorton al la Tagaloga, Pilipino, kaj Filipino. La malsameco de tiuj tri montras politikan tendencon. Multaj lingvistoj opinias, ke ĉiuj tri estas esence la sama lingvo.

La nova alfabeto de Filipino havas 28 literojn; Pilipino havas nur 20. Esence la nova alfabeto estas la sama kiel la Angla kun du aldonitaj literoj, 'Ng' kaj la Hispana <enye> 'Ñ'. Tio estas:

Majuskla	Minuskla	Majuskla	Minuskla
A	a	Ñ	ñ
B	b	Ng	ng
C	c	O	o
D	d	P	p
E	e	Q	q
F	f	R	r
G	g	S	s
H	h	T	t
I	i	U	u
J	j	V	v
K	k	W	w
L	l	X	x
M	m	Y	y
N	n	Z	z

Filipinojn koloniis dufoje Okcidentanoj. Filipinojn koloniis la Hispanoj dum 333 jaroj ekde la 16a jarcento. Post la Hispana-Usona Milito kaj ekde 1898 Filipinojn administris Usono. En 1946 Filipinoj gajnis sendependecon. Pro tiu kialo la aktuala parolado de Filipinanoj havas multajn pruntvortojn el la Hispana kaj la Angla.

La tipa Tagaloga frazo <Asúl ang kotse ko> signifas <Mia aŭtomobilo estas blua>; <kotse> venas el la Hispana <coche> (aŭtomobilo) kaj <asúl> venas el la Hispana <azul> (blua). Se Filipinojn koloniis la Hispanoj dum pli ol 300 jaroj, kial Filipinanoj ne parolas la Hispanan? Fakte nuntempe malmultaj Filipinanoj parolas flue la Hispanan. Malsame kiel en Meksiko, la Hispanaj monaĥoj ĝenerale ne instruis sian lingvon al la indiĝenoj por ke ili pli bone regu ilin, kaj malpermesis aliron al gravaj institucioj kiel al la Eklezio. Ankaŭ malsame kiel en Meksiko, malmultaj Hispanoj vivis efektive en Filipinoj. Grade, antaŭ la alveno de Usonanoj, la Hispana ja disvastiĝis ĝenerale. Sed aldonendas, ke kiam la Usonanoj alvenis, la novaj koloniistoj trudis aktive la Anglan al la indiĝenoj. Krome, ekzistas Hispanbazita kreolaĵo, la Ĉavakana, kiun parolas ĉirkaŭ trionmiliono da Filipinanoj.

Kiam alvenis la Hispanoj, ili enkondukis la Roman alfabeton al la indiĝenoj. Nuntempe ĉiuj ĉefaj Filipinaj lingvoj skribiĝas per la Romaj literoj. Antaŭe estis antikva indiĝena skribsistemo, kiu nomiĝas "Baybayin (http://www.unicode.org/charts/PDF/U1700.pdf)". En 1604 Jezuita historiisto, Pedro Ĉirino, skribis en dokumento *Relación de las Islas filipinas*, ke inter la insulanoj skribado kaj legado estis popularaj je Baybayin. Baybayin ampleksas seriojn da silaboj; efektive ĝi ne estas alfabeto, sed silabaro. Ekzemple, simbolo, kiu aspektas kiel inversa koro sonas kiel /ba/; kiam estas punkto super tiu, ĝi sonas kiel /bi/; kiam estas punkto sub tiu, ĝi sonas kiel /bu/. Antaŭe la Tagaloga estis esence trivokala.

Tio estis la pasinteco de la Tagaloga. Pri la estonteco, kio estos? Nuntempe la influo de la Angla regas. En Manilo oni aŭdas familiaran lingvon, kiun oni nomas "Taglish" (Tagangla). Ĝi estas kunfandiĝo de la Tagaloga kaj la Angla. Multaj sentas, ke la Tagangla estas lingvaĉo. Teknike, ĝi estas *kodŝaltado*. Ekzemplo de tio kun la Anglaj vortoj kursivaj estas: < *By the way*, may klase ako bukas. *In fact*, *busy* ako buong araw. Puwede bang magkita tayo *next week*? > (Parenteze, mi havos klason morgaŭ. Fakte, mi estos okupata la tutan tagon. Ĉu ni povas kunveni la venontan semajnon?) En amaskomunikiloj oni aŭdas kaj legas la Taganglan. Malgraŭ la registaraj politikoj pri lingva uzo de Pilipino aŭ Filipino, la Tagangla regas, speciale en la Manila regiono, sed malpli en aliaj lokoj. Oni rimarkas, ke en Tagalogaj provincoj ekster la Manila regiono, la lingvaĵo estas malpli miksata kun Anglaj vortoj. La Tagangla estas plejparte konversacia kaj ne taŭgas por verki seriozaĵojn kiel oficialajn kaj teknikajn dokumentojn.

Tajlandanoj rigardas Holivudajn filmojn kun Tajaj subtitoloj. Indonezianoj rigardas Holivudajn filmojn kun Indoneziaj subtitoloj. Sed Filipinanoj rigardas Holivudajn filmojn sen subtitoloj en sia lingvo. Fakte, pri la Angla mem, pli da 50% da Filipinanoj konstatas, ke ili scipovas ĝin. Sed tiu procento verŝajne reduktiĝos en la estonteco... Pli kaj pli da la Tagaloga, la Filipina, enkondukiĝas en ĉiuj niveloj de la lernejoj. Aldonendas, ke multaj kvalifikitaj geinstruistoj de la Angla forflugas el la lando al aliaj landoj pro pli altaj salajroj.

Pli kaj pli da televidprogramoj estas en la Filipina, ne en la Angla. Pli kaj pli la amaskomunikiloj Filipiniĝas. En la 1970aj jaroj, geknaboj spektis animaciojn aŭ kartunojn en la Angla, sed nun animacioj sonduobliĝas per la Filipina eĉ el Japanio aŭ aliloke, same kiel tagdramoj el Latinameriko kaj Orientazio.

Eble estonte malpli da Filipinanoj estos fluaj parolantoj de la Angla. En sia serĉo por nacia identeco, la Filipinanoj sentas, ke la Filipina pli gravas al ili. Kaj estas dilemoj. La Angla estos ankoraŭ grava kiel interkomunikilo kun la ekstera mondo. Aldonendas, ke la Manilocentra Tagalogcentra lingva politiko sentiĝas de kelkaj ne-Tagalogoj kiel speco de nova koloniismo, pro kiu aliaj Filipinaj lingvoj paŝon post paŝo elpuŝiĝos. Tamen, multaj Filipinanoj, inkluzive de ne-Tagalogoj, sentas, ke ili vere bezonas nacian lingvon. Fakte, estas sekure por diri, ke praktike ĉiuj junaj Filipinanoj, la nova generacio, scipovas la Filipinan. En Filipinoj, la gepatralingvanoj kaj dualingvanoj de la Tagaloga nombras proksimume 100 milionojn. Kaj multaj aliaj parolas ĝin tutmonde.

Pruntvortoj

El la angla aŭ el aliaj lingvoj, kutime ekzistas almenaŭ du etapojn por prunti vortojn en Filipinon (la Tagalogan). La lasta etapo tagalogigas la ortografion.

> Iniciata pruntetapo: <Kumakain ang teacher ng ice cream.>
> Lasta pruntetapo: <Kumakain ang titser ng ayskrim.>
> Esperanto: La instruisto manĝas glaciaĵon.

Hispana influo

Ekzemploj el multo:

- *hepe* - jefe - ĉefo
- *kumpisal* - confesar - konfesi
- *dalanghita* - naranjita (mandarina) - oranĝo
- *silya* - silla - seĝo
- *kabayo* - caballo - ĉevalo
- *relos* - reloj - horloĝo
- *harina* - harina - farino
- *oras* - horas - horoj
- *kotse* - coche - aŭto
- *saklolo* - socorro - helpo
- *gobiyerno* - gobierno - registaro
- *luku-loko* - loco - freneza
- *pero* - pero - sed
- *porke* - porque - kial
- *pwersa* - fuerza - forto
- *gwapo* - guapo - bela
- *kwento* - cuento - rakonto
- *pwesto* - puesto - posteno
- *nweba* - nueva - nova
- *o* - *o* - aŭ
- *Pilipinas* - Filipinas - Filipinoj

Gvidlinioj por la plibona Tagaloga

- Ĉiam uzu supersignojn en teksto.
- Uzu kursivajn literojn aŭ citilojn por Anglaj aŭ alilingvaj vortoj, kiuj ne ortografie tagalogiĝis:

<Nime-*mention* ko sa kanyá ang *document* mong ibinigáy mo sa akin.>

- Uzu kiel vortprovizan normon, la vortaron *UP Diksiyonaryong Filipino* de la Universitato de Filipinoj.
- Pli bone tagalogigu la ortografion de fremdaj vortoj el la Angla, kaj certe el la Hispana.
- Uzu pli modernan vortprovizon por pli klara kompreno.

Gvidlinioj por la kutima Tagaloga

- Ne uzu supersignojn en teksto. Se uzu ilin, estu nur pro kelkaj pli raraj vortoj por distingi homonimojn; ekzemple:

<Ang mga kaibigan niya ay minamahal ang káibigán nila.>

<Nilagyan niya ng sukà ang kanyang kanin.> (La vorto <suka> malsamas de <sukà>.)

Pli ofte, la kunteksto malbezonigas supersignojn.

- Uzu Anglecan sistemon de citiloj; ekzemple:

<"Aalis ka," sabi ni Juan.>

- Por titoloj, uzu Anglecan sistemon: Majusklas la unua litero de la unua vorto kaj, poste, de neprepoziciaj aŭ neindikilaj vortoj; ekzemple:

<Ang Isip ni Juan tungkol sa mga Bulaklak sa Pilipinas>

- Ne uzu kursivajn literojn por Anglaj vortoj en kutima teksto.
- Uzu Hispanajn aŭ Anglajn pruntvortojn anstataŭ antikvajn Tagalogajn por pli bona kompreno.

Skribado per la antikva *Baybayin*





La *Baybayin* skribiĝis de maldekstro al dekstro, de supro al malsupro. Kutime, ne ekzistis spacoj inter vortoj. Vertikala linio (|) aŭ du linioj (||) funkciis kiel la Okcidenta komo aŭ punkto aŭ kiel ofte apartigilo de nepredikteblaj aroj da vortoj. Simple, la punkta supersigno indikis la vokalon /i (e)/, kaj la punkta subsigno indikis la vokalon /u (o)/. La kruca subsigno ne ekzistis antaŭ la Hispana Erao. Ĝi nuligis la vokalon /a/ de la silabo. Antaŭ la Hispana Erao, silabfinan konsonanton oni ne prizorgis kaj ne skribis. Tio estis poezia aspekto de la antikva skribado originale.

Ekzemple, originale, literojn enparenteze oni ne skribis:

Na(g)lalaro

Kumakai(n)

Marami(ng) baga(y)

Bula(k)la(k) doo(n)

Kaho(y) di(n)

Rekomendataj vortaroj

- Almario, Virgilio S. *UP Diksiyonaryong Filipino.* Filipinoj: Anvil Publishing Inc., 2001.
- Enriquez, Maria Rosario, & Enriquez, M. Jacobo. *New Handy English Webster's Dictionary: English-Tagalog Tagalog-English.* Filipinoj: Philippine Book Company, 1986.

Eksteraj ligiloj

- "Ating Baybayin, Our Filipino Script" de Victor Quimson (http://www.eaglescorner.com/baybayin/) angle
- Retejo "Bibingka" de Hector Santos (http://www.bibingka.com/) angle
- La "Manifesto de Prago" de UEA en Tagaloga traduko, de Filipina Esperanto-Asocio, en rete arkivigita versio (http://web.archive.org/web/20091026192421/http://geocities.com/vixcafe/praga.html)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tagaloga_lingvo&oldid=6991121"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:23, 4 jul. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.